La 7-a Irana Esperanto-Kongreso, kio unuafoje – sekve de la k(o)ronvirova epidemio – okazis rete de la 16-a ĝis la 19-a de aprilo 2020 kun 121 partoprenintoj el 35 landoj;

- Aŭskultinte la salutmesaĝojn de la prezidanto de Universala Esperanto-Asocio kaj de la esperantistaj organizaĵoj el Ĉinujo, Germanujo, Indonezio,
- Aŭskultinte la paroladon de unu el la grandaj nuntempaj lingvistoj, d-ro Robert Phillipson, el la universitato de Kopenhago, la plej konata subtenanto de egaleco kaj kontraŭ-imperiismo en la kampo kultura kaj lingva;
- Debatinte pri la problemoj de la movado por la internacia lingvo Esperanto en Irano kaj en la mondo;
- Analizinte la situacion en multaj landoj lige al la krizo pro la monda epidemio kaj lige al aliaj nesolvitaj problemoj pri manko de kunlaboro inter landoj kaj pri agreso militaj kaj ekonomiaj

Deklaras, ke:

- Problemoj kiel tiuj de la monda epidemio kaj de la klimato-ŝanĝiĝo klare montras, ke la mondo estas unu, kaj interligita, kaj ke tiaj vastaj kaj vere danĝeraj problemoj povas esti solvataj nur je tutmonda nivelo;
- Solvoj de tiaj problemoj kaj de aliaj, kiel malsato, manko de lernejoj kaj kuracado por ĉiuj, bezonas mondon sen militoj kaj sen aliaj formoj de agreso;
- Sociaj sistemoj, kiuj privilegias individuajn rajtojn kaj individuan profiton kaj malatentas sociajn problemojn kaj solidarecon kun suferantoj pro mizero, subevoluo aŭ malsanoj, jam montris sian kruelecon al homoj kaj sian neefikecon en krizaj situacioj kiel la nuna kaj devas absolute ŝanĝiĝi;
- Post la fino de la nuna krizo pro la monda epidemio, la mondo bezonas pacon, dialogon, solidarecon kaj toleremon antaŭ malsameco de ideoj kaj vivkonceptoj;
- En tia nova mondo sen imperiismoj kaj hegemoniismoj ankaŭ en la lingva kaj kulturaj kampoj, la internacia lingvo Esperanto, tutmonda lingvo de paco, interkompreniĝo kaj kunlaboro, povos trovi sian ĝustan kaj justan lokon.

Parolado de Humphrey Tonkin al la 7-a Irana Esperanto-Kongreso 18 aprilo 2020



Esperanto: Esprimilo homa

Tutunue mi diru al vi kiel granda plezuro estas havi okazon alparoli iranajn esperantistojn. Mi tra multaj jaroj sekvis la Esperanto-agadon en Irano – fakte ekde la mezaj 1970aj jaroj. Mia sola vizito al Irano, en 1977, konvinkis min ne nur pri la efika agado de la iranaj esperantistoj por Esperanto sed ankaŭ pri la gastamo kaj progreso de la lando. Ni nun troviĝas en periodo de krizo politika kaj saneca. Ĉu eble la nuna pandemio instruos al ni denove kiel grave estas konservi la homan vivon, kiel esence estas, ke ni kune laboru por la bono de la homaro? Ĉu eble unu krizo, tiu pri la korona viruso, povus konvinki nin forigi alian – tiun pri politika dividiĝo, malamo kaj senseca elspezo de energio je eterna disputado? Kaj ĉu la mesaĝo de Esperanto povus rapidigi la alvenon de la paco? Ni povas almenaŭ tion esperi.

Mi volas paroli hodiaŭ pri temo eble iom abstrakta sed tamen grava – la ekesto de Esperanto kaj ĝia rolo en nia moderna mondo. Samtempe tiu ĉi estas prelego, ne inspira parolado. Espereble vi pretos atenti kaj mi povos diri al vi ion novan...

Iom da historio

En la tempo de Zamenhof, tri lingvoj havis proksimume egalan influon en la aferoj de Eŭropo: la franca, la germana, la angla.

Francaj intelektuloj de tiu epoko ligis la francan lingvon al la klasika tradicio, konsiderante sin la heredantoj de la granda Roma Imperio kaj la glorioj de la latina lingvo. La franca ĝuis altan prestiĝon.

Germanaj intelektuloj same identigis sin kun la klasika tradicio. Sed por ili temis pri pli vasta tradicio: ili identigis sin ne nur kun la latina sed ankaŭ kun la greka: fakte kun la hindeŭropaj lingvoj ĝenerale. La eltrovo de la hindeŭropa “familio” de lingvoj estas atribuebla al britaj funkciuloj en Hindio fine de la dekoka jarcento, sed ĝi estis aparte kaptita de la germanlingvanoj, kiuj baldaŭ sin identigis kun la integriĝo de la sanskrita kaj la persa en la intelektan kaj filologian historion. Interalie la germanoj komencis vastajn arkeologiajn esplorojn tra Mezoriento. Samtempe, kaj eĉ pli decide, ili ankaŭ kreis la koncepton de la “esplora universitato” kie dominis ne tiom la instruado de junuloj kiom la



scienca esplorado.

La angla lingvo gajnis vastan adeptaron pro ekonomia kresko de Britio kaj de Usono kaj la samtempa ekspansio de la kolonioj, precipe Aŭstralio kaj Kanado, kaj sekve de tutmonda komerco. Ankaŭ Francio simile ekspansiis, la germanaj ŝtatoj kaj poste la unuigita Germanio malpli. Sed la germana siavice ĝuis gravan pozicion en la scienco (inkluzive medicinon), kaj la franca en la mondo de internacia diplomatio. Usono baldaŭ kaptis de la germanoj la ideon de universala universitato, samtempe dediĉita al instruado kaj esplorado, kaj kun emfazo je doktoraj studoj. Tio do ankaŭ fortigis la anglan lingvon.

Ne nur tio: kresko de moviĝo ene de Eŭropo, kune kun kresko de klerigo, kreis lingvajn problemojn kie ili ĝis tiu punkto apenaŭ ekzistis: la germana regis en Centra Eŭropo, la franca en okcidenta Eŭropo. En Orienta Azio, kune kun la industriigo de Japanio, kreskis la influo de la japana. Simila ekspansio okazis rilate la araban, sed temis pri esence religia ekspansio. La ekspansio de la araba kaj la japana estis plejparte

regionaj fenomenoj, same kiel la pozicio de la turka, la persa, la hindia k.s. La ĉefaj eŭropaj lingvoj tamen aspiris al tutmonda influo.

En tiun konfuzon de lingvoj plonĝis Zamenhof. Kvankam abundas ĝermanaj radikoj en Esperanto, Zamenhof identigis sin kun la latina kontinuo, kiun siavice apogis la francaj intelektuloj: la gramatika sistemo de Esperanto, kvankam draste simpligita, similas tiun de la latinidaj lingvoj. Nur en lastaj jaroj oni klarigis, ke je pli profunda nivelo tiu gramatiko havas elementojn similajn al ekzemple la ĉina.

La leksikon Zamenhof prenis ĉefe el la latinidaj lingvoj, la semantikon el la ĝenerala semantika provizo de la eŭropaj lingvoj..

Alivorte dirite, Zamenhof ekspluatis la propran scion de lingvoj, sed kun emo ligi sin al la (laŭ reputacio) intelekto kaj literature supera franca lingvo – do ne al la germana lingvo kaj ties branĉoj, malgraŭ tio, ke la patro estis instruisto de la germana. Eĉ oni povus argumenti, ke certagrade Zamenhof reagis kontraŭ la germana.

Ne mankas influo de la rusa kaj rusdevenaj lingvoj en Esperanto, en la vortprovizo, la semantiko, kaj la kutima uzado, sed al tiuj lingvoj mankis la prestiĝo identigebla kun la franca – kaj Zamenhof tre konscie celis krei prestiĝan lingvon, kiu superu la kutimajn kritikojn kontraŭ arte kreitaj lingvoj, ke ili estas nur limigitaj esprimiloj sen beletraj kaj historiaj tradicioj. Nur tiel li havus ŝancon akiri la subtenon de la opiniformantoj.

Evidente, Zamenhof uzis lingvajn elementojn kiujn li konis, kaj atentis pri la grandaj fluoj en la filologio kaj lingvistiko de la periodo. La identigo, fine de la dekoka jarcento, de komunaj radikoj inter la latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj unuflanke kaj la sanskrita kaj la persa aliflanke, do la eltrovo de la “hindeŭropa lingva familio”, nur plifortigis la decidon de Zamenhof identigi sin kun la franca lingvo, kies intelektuloj spuris la propran lingvan pasintecon de la latina lingvo de Vergilio kaj Horaco, pere de la frankoj de la regiono en la nuna orienta Francio kaj okcidenta Germanio, ĝis la t.n. “aŭtentikaj heredantoj” de la latina tradicio, nome la francoj.

Ĉu mi aldonu, ke iasence tiu tuta klasika tradicio estis blufu: spaca vojaĝanto en vizito al nia planedo antaŭ, ni diru, 2500 jaroj verŝajne elektus la persan aŭ la ĉinan por krei sian mondan lingvon?...

Sed, por reveni al mia kerna argumento...

Jen la esenca paradokso de Esperanto: ĝi celis tutmondan uzon, sed celis tiun tutmondigon en la kunteksto de eŭropa ekspansio – kaj la ekspansio de la hinda-persa-greka-romia influfero.

Perfekto aŭ utiligeblo?

Lingvistike, do, Esperanto ne estas neŭtrala. Fakte, se oni imagas neŭtralan lingvon kiel lingvon kiu enhavu etajn partetojn el ĉiuj regionoj de la mondo, la rezulto estus neŭtrala nur en la senco, ke tiu lingvo estus egale malfacila por ĉiuj popoloj. Kaj, cetere, eĉ se tia “tutmondeco” eblus en la vortprovizo, ĝi verŝajne ne eblus gramatike, kie ja necesas elekti unu sistemon super aliaj. Kaj semantike tia neŭtrala elekto kreus veran kaoson.

Zamenhof celis ne universalecon lingvan, sed facilecon kaj esprimkapablon – ne perfektecon sed utiligeblon. Mi argumentus, ke li bone atingis tion.

La itala profesoro kaj verkisto Umberto Eco dediĉis signifan atenton al Esperanto en sia libro de antaŭ dudek kvin jaroj La serĉado de la perfekta lingvo. Sed eĉ se poetoj celas perfektan esprimovon en la kreo de siaj verkoj, kaj eĉ se iasence Zamenhof posedis la kreemon de poeto, lia celo en la kreo de Esperanto ne estis perfekteco sed utileco.

Mi ne povas tro forte emfazi tiun aspekton de Esperanto: ĝi ne estas perfekta lingvo, nek celas esti perfekta lingvo: ĝi estas lingvo por la facila utiligo de ni neperfektuloj, kiuj baraktas konstante kun lingvaj problemoj kaj lingva malegaleco.

Ĝi ne estas egale facile lernebla de la parolantoj de ĉiuj lingvoj. Dum ni parolantoj de la angla aŭ la persa povas trovi komunajn elementojn en la gramatiko de Esperanto, kaj dum parolantoj precipe de la angla trovas amason da radikoj kiujn ili konas, japanaj esperantistoj ne ĝuas tiun avantaĝon. Iliaj problemoj estas aliaj ol tiuj kiujn frontas ĉinoj, sed ankaŭ ili trovas la komencajn paŝojn malfacilaj.

Sed Esperanto estas multe pli facile lernebla ol la tielnomata internacia lingvo la angla – kaj la aliaj eŭropaj lingvoj.

Fakte, en la batalo de la lingvoj kiun Zamenhof frontis en la finaj jaroj de la denaŭa jarcento, estis ĉefe la angla kiu grandparte sukcesis. La britoj kaj usonanoj (kune kun kanadanoj, aŭstralianoj ktp.) troviĝis ĉe la ĝusta flanko en du mondmilitoj, dum la germanoj malvenkis ambaŭfoje. Tio, en kombino kun la efiko de faŝismo en la 1930aj jaroj, esence detruis la avantaĝojn de la germana lingvo en la sciencoj. La francoj posedis vastan reton de kolonioj, sed nur la britoj sukcesis starigi fortajn memstarajn ĉefe anglalingvajn ŝtatojn en Aŭstralio, Novzelando, Kanado, Barato kaj Sudafriko. Dume la usonanoj vastigis sian ekonomian hegemonion tra grandaj partoj de la mondo kaj mem evoluigis la proprajn internajn edukajn kaj ekonomiajn fortojn.

En la diplomatio la batalo certagrade daŭris kaj daŭras.

Decida estis la elekto de du oficialaj lingvoj en la Ligo de Nacioj en 1919-20: la angla kaj la franca. Post la invento de simultana interpretado kaj la fondo de Unuiĝintaj Nacioj, la nombro de lingvoj oficiale uzataj en Unuiĝintaj Nacioj kreskis ĝis ses, sed ĝis hodiaŭ la du laborlingvoj de la Sekretariato de UN restas la angla kaj la franca. Pli kaj pli dominas la angla. Samo okazis ankaŭ en la Eŭropa Unio, kie amasas la oficialaj lingvoj sed la angla fariĝas ĉiam pli forta.

Pasinteco kaj estonteco

Ĉu, do, Esperanto havas ŝancon? Ĉu tiu eta lingvo de Zamenhof, kiu neniam ĝuis la subtenon de la oficialaj instancoj nek la diversaj ŝtatoj, povas ludi rolon en la estonteco de la internacia vivo?

Unue necesas emfazi, ke en la 1880aj jaroj, kiam la batalo de la lingvoj flamis en la internacia vivo, Esperanto nur je tiu punkto ekestis. La regantoj de la grandaj ŝtatoj sisteme ĝin rezistis, argumentante, ke ĝi estas lingvo nur de kelkaj stranguloj kaj ke ĉiuokaze ĝi havas nek la riĉecon nek la historion de la tielnomataj grandaj lingvoj. La subita kresko de la lingvo en la jaroj post la Unua Mondmilito estis esence nuligita ne de la limigoj de la lingvo mem sed, male, de ĝiaj kapabloj: la soveta registaro de Stalin, ekrovante, ke sovetaĵoj tro efike komunikas per Esperanto al eksterlando la mankojn de Sovetunio, fermis la movadon kaj persekutis ĝiajn subtenantojn; kaj faŝistoj ĉie ĝin kontraŭis. Post la Dua Mondmilito, la venkintaj ŝtatoj ne interesiĝis pri neŭtrala solvo de la problemo de internacia komunikado, sed preferis en plej bonaj okazoj sin apogi per la novaj sistemoj de simultana interpretado. Sovetunio forte subtenis la rusan lingvon, kiu gajnis iom da influo en la sciencoj, sed kun la kolapso de Sovetunio kolapsis tiu influo.

Kaj hodiaŭ ne mankas parolantoj kaj uzantoj de la Internacia Lingvo: verŝajne estas pli da sciantoj de la lingvo hodiaŭ ol iam ajn en ĝia historio.

Samtempe ni frontas novajn defiojn. La antaŭenmarŝo de la teknologio draste faciligas la tradukadon kaj baldaŭ havos similan efikon je interpretado; la konkurenco inter la ŝtatoj plifortiĝis kaj la multflankismo reduktiĝis. Fakte, oni havas la impreson, ke, almenaŭ en la politiko, ju pli oni faciligas la interlingvan komunikadon, despli oni uzas ĝin por reciproke insulti, por fortigi la propran pozicion koste de aliaj, por aserti la propran superecon..

Kaj ĉion ĉi oni faras meze de pandemio kiu minacas ĉiujn homojn, ĉiujn landojn, kaj en klimata krizo kiu povus detrui la planedon. Se tiel estas, tiuj kiuj kondamnas la zamenhofan lingvon kiel frenezajon estas mem frenezaj, kaj tiuj kiuj subtenas tiun lingvon saĝe komprenas fundamentan veron, nome la neceson

sekvi la vojon de paco, de komuna interhelpo, kaj de universalaj solvoj al la problemoj kiuj minacas la planedon.

En la dektri jardekoj de post la kreo de Esperanto, tiu lingvo fariĝis plene esprimova, plene kapabla kiel lingvo. Zamenhof saĝe transdonis la evoluon de la lingvo al ĝiaj uzantoj: li retiriĝis el sia rolo kiel kreinto de la lingvo kaj lasis la esperantistojn mem ĝin kultivi. Kiam iuj esperantistoj sugestis, ke oni povas plibonigi la lingvon, la plimulto de la uzantoj de la lingvo tamen daŭrigis la uzadon de la lingvo kiun ili jam lernis – ĉar jam en 1907, la jaro de la Ido-skismo, la lingvo, nur dudekjara, jam fariĝis plene uzebla lingva sistemo. La perfektistoj transiris al Ido kaj poste al diversaj aliaj eĉ pli “perfektaj” lingvaj sistemoj, kaj fine disipiĝis en la aeron kiel nura lingva nebulo. La veraj idealistoj, kiuj volis solvi la problemon de la lingvoj, restis fidelaj al Esperanto.

Mi jam sugestis, ke hodiaŭ Esperanto havas pli da scipovantoj kaj uzantoj ol iam ajn en sia historio. Tio okazas parte pro la Interreto, per kiu oni povas relative facile lerni la lingvon – kaj tre facile utiligi ĝin. En la reto abundas materialo en Esperanto, abundas metodoj por kunligiĝi kun aliaj uzantoj de la lingvo, tiel ke kreiĝas virtuala lingva komunumo vere potenca.

La koncepto de egaligo

Sed en tiu situacio perfekte estas malamiko de bono: oni povas tiel perfekte uzi la lingvon, tiel bone ĝui ĝin, tiel facile ligiĝi kun homoj en aliaj partoj de la mondo, ke oni forgesas, ke Esperanto estas pli ol lingvo por persone kontaktiĝi kun simpatiuloj en aliaj landoj. Esperanto estas respondo al pli granda problemo ol tio – nome al la esenca malegaleco de lingva komunikado en la mondo. Bele, ke oni praktikas lingvan egalecon en tiuj personaj kontaktoj; malbele, ke oni nesufiĉe atentis la fundamentan ideon malantaŭ Esperanto – tion kion oni povus nomi la egaliga ideo.

Kion mi celas per tiu nocio de “egaligo”? Ĉie en la mondo oni vidas ekzemplojn de la lingva diskriminacio. Tiu kiu posedas la anglan lingvon ne nur havas avantaĝon en la internaciaj aferoj per sia scio de tiu lingvo, sed povas uzi tiun scion por malavantaĝi aliajn. Facile la unuopaj usonanoj dungiĝas en la sekretariato de Unuiĝintaj Nacioj, sed la ĉinoj (ekzemple) devas investi en tuta eduka sistemo por krei homojn kapablajn lingve konkurenci por tiuj postenoj. Kaj eĉ en plej bona okazo, denaska parolanto de la angla lingvo ĝuas avantaĝojn en la intertrakto, povas pli facile esprimi sin, povas pli facile persvadi.

Bedaŭrinde la flujaj nedenaskaj parolantoj de la angla lingvo estas tiel fieraj pri la propra scio, ke ili, konscie aŭ subkonscie, baras la vojon al siaj samlingvanoj per

la propra lojaleco al la angla lingvo. La angla estas ne nur utila: ĝi estas ankaŭ prestiĝa – kaj prestiĝo dependas de la ekzisto de homoj kaj lingvoj al kiuj mankas prestiĝo.

Mi mencias Unuiĝintajn Naciojn ĉar, kiel reprezentanto de Universala Esperanto-Asocio ĉe UN, mi konas ĝin plej bone. Sed tio kion mi diras estas same aplikebla al ĉiuj flankoj de komerco, de diplomatio, de scienco: la uzo de naciaj lingvoj en internaciaj kuntekstoj estas esence neegaleca.

Fakte, la lingvoscio, kaj la prestiĝo aŭ manko de prestiĝo de unuopaj lingvoj, havas sian efikon je ĉiuj niveloj de la homa socio. Parolantoj de minoritataj lingvoj suferas diskriminacion kaj devas porti la ŝarĝon de lernado de dua lingvo por roli en la propra nacia socio. En multaj okazoj, iliaj lingvoj estas eĉ ne uzataj en lernejoj, kaj ili do devas akiri novan lingvon eĉ por edukiĝi. Ofte, la rezulto estas, ke ili estas porĉiame en malavantaĝa pozicio. Kaj la parolantoj de la domina lingvo laboras por sekurigi sian superan pozicion, ignorante la artajn kreaĵojn de tiuj minoritatoj, ekskludante ilin el la ekonomio, ekspluatante ilin.

Tio okazas ĉie en la mondo. Lingvoj estas unu el la ĉefaj motivoj de diskriminacio, forpreno de homaj rajtoj, bagateligo de aliaj. Kiel mi diris pli frue: prestiĝo dependas de la ekzisto de neprestiĝo; egaleco de tiuj en superaj pozicioj dependas de malegaleco de aliaj; supero supozigas malsuperon kaj malsupero supozigas superon.

Bedaŭrinde ni esperantistoj, ĝuante la lingvan donacon de Zamenhof, neglektas la disvastigon de la ideoj malantaŭ ĝi. Ne sufiĉas scipovi Esperanton: necesas uzi ĝin. Ne sufiĉas uzi Esperanton: necesas disvastigi ĝin. Ne sufiĉas disvastigi Esperanton: necesas disvastigi la fundamentan ideon malantaŭ ĝi – tiun de lingva egaleco. La problemo de lingvoj en la mondo ne estas nur problemo de kompreno sed ankaŭ problemo de socia ordo: por krei internacian harmonion oni bezonas internacian lingvon.


Tiuj estas grandaj ideoj. Indas ankaŭ malhisi ilin al la nivelo de ni simpluloj. Mia mesaĝo simplas: necesas labori por nia idealo per ĉiuj eblaj rimedoj, ĉar ĝi estas fundamenta elemento en la vojo al mondo pli kapabla fronti la problemojn kiujn ni ĉiuj frontas – la problemojn de sano, de milito kaj paco, de edukado, de egaleco, de klimata bonfarto – problemojn homajn, solveblajn per solvoj homaj – solveblajn ankaŭ per utiligo de egaliga kaj egaleca internacia lingvo.

ادامه دوره‌های آنلاین آموزش اسپرانتو



دوره آموزش آنلاین زبان اسپرانتو (سطح مقدماتی) در آکادمی بین‌المللی علم با همکاری سازمان جوانان اسپرانتیست ایران و تدریس آقای مهندس احمدرضا ممدوحی (نخستین سرنماینده انجمن جهانی اسپرانتو در ایران، ریاست اسبق انجمن اسپرانتوی ایران و مؤلف کتاب ارزشمند آسان‌ترین زبان دنیا) در حال برگزاری می‌باشد. زبان آموزان این دوره را ۱۵ نفر از سراسر ایران و کشورهای عراق، آلمان و اسپانیا تشکیل داده‌اند.

کتابی دیگر از زبان اسپرانتو به فارسی ترجمه و منتشر شد



به همت جناب آقای دکتر محمد کرام‌الدینی و پس از سی سال، کتاب ولگردها از زبان اسپرانتو، ترجمه و منتشر شد و گنج دیگری بر گنجینه‌ی آثار ترجمه شده از اسپرانتو به فارسی افزوده شد. آن هم در حالی که از انتشار کتاب زیر نور شمالی خانم صولت، اندک زمانی نمی‌گذرد. مصاحبه خواندنی و جالب با دکتر کرام‌الدینی در صفحات ۲۱ تا ۲۳ این شماره از مجله را از دست ندهید.

تحصیلات تابستانی اسپرانتو ۲۰۲۰ مجازی و در سراسر جهان



شرکت کنند. بسیاری از افراد امکان شرکت در رویدادهای حضوری را ندارند - یا به دلیل مسافرت طولانی، به دلیل امور مالی، کمبود وقت یا به دلایل دیگری. اکنون می‌توان یک رویداد بین‌المللی را تجربه کرد و در عین حال در خانه ماند. علاوه بر این، هم در هزینه - هزینه SES آنلاین به طور قابل توجهی پایین است - و هم در زمان - نیازی به سفر به محل برگزاری SES و بازگشت نیست - صرفه‌جویی قابل توجهی می‌شود. ضمناً این طرح از نظر زیست‌محیطی نیز سازگارتر است!

از طریق فرم ثبت‌نام در وبسایت به اولین SES مجازی جهانی بپیوندید - <https://ses.ikso.net/2020/eo/aligxilo/> آیا دوست یا آشنای دیگری دارید که علاقه‌مند به این رویداد باشد؟ ممکن است کسی از دوستان شما مایل باشد شرکت کند؟ حضور آنها را هم توصیه کنید! در واقع، پیشرفت در زبان و تدریس آن می‌تواند به صورت آنلاین ترتیب داده شود، و سپس فرد قادر خواهد بود با سطح زبانی بالاتر در رویدادهای اسپرانتویی شرکت کرده و برای پیشبرد این زبان فعالیت کند.

E@I در حال حاضر با جدیت در مورد جزئیات این نوع SES کاملاً آنلاین کار می‌کند: فرم، محتوا و وبسایت آن. اطلاعات بیشتر به زودی در وبسایت SES و همچنین صفحه فیس‌بوک <https://mallonge.net/SES2020> ظاهر می‌شود.

امیدواریم که از رویداد ما لذت ببرید و با وجود پاندمی، تابستان امسال جلسات اسپرانتو را از دست ندهید - ما همه کارها را می‌کنیم تا SES مجازی ما به موفقیت برسد!

سونیا زارتسکایا
عضو تیم SES

امسال E@I (اسپرانتو در اینترنت - سازمانی مردم‌نهاد با هدف گسترش کاربرد اسپرانتو در اینترنت) یک مدرسه‌ی اسپرانتوی مجازی، ویژه و منحصر به فرد را برای شما تدارک دیده است! موانع ناشی از بیماری همه‌گیر کرونا اجازه نمی‌دهند که برنامه همه‌ساله "تحصیلات تابستانی اسپرانتو (SES) به صورت حضوری، طبق برنامه قبلی، در جمهوری چک اتفاق بیفتد. اما این اتفاق خواهد افتاد - مجازی و جهانی! برنامه‌ریزی شده است که این SES در تاریخ ۱۸ تا ۲۶ جولای ۲۰۲۰ برگزار شود، و تدریس اصلی در طول دو آخر هفته (با یک برنامه اختیاری اضافی بین آنها، عمدتاً در بعدازظهر / عصر با توجه به منطقه زمانی اروپای مرکزی) برگزار می‌شود.

در طول دوره SES نه تنها سطوح مختلف دوره‌های اسپرانتو وجود خواهد داشت، بلکه دوره‌ای در مورد ادبیات و فرهنگ اسپرانتو و یک دوره اضافی برای ترجمه از و به اسپرانتو نیز برگزار می‌شود. این دوره‌ها توسط معلمان باتجربه اداره می‌شوند. جزئیات بیشتر در مورد آنها:

<https://ses.ikso.net/2020/eo/instruado/>

دوره ادبیات اسپرانتو توسط اولگ (Oĉjo) چایکا از روسیه، و دوره ترجمه توسط نویسنده / مترجم معروف میکائیل برونشتاین هدایت می‌شود. علاوه بر این، شرکت‌کنندگان در سخنرانی‌ها، بحث‌ها، آزمون‌ها، کنسرت‌ها و موارد دیگر شرکت می‌کنند.

البته، هیچ‌کس از وضعیت بروز ویروس کرونا در جهان خوشحال نیست - باین حال، از سوی دیگر، با چنین "SES مجازی" در مدرسه آنلاین اسپرانتو ما همه افراد از هر نقطه جهان قادر خواهد بود حتی بیشتر از حد معمول

La mondo ne plu estos la sama denove.

Ni endormiĝis en unu mondo, kaj vekigis en alia!

Subite Disnio ne plu havas magion,

Parizo ne plu estas romantika,

Novjorko ne stariĝas plu,



Ĉina Muro ne estas fortikaĵo plu, kaj Meko estas malplena.

Brakumo kaj kisoj subite fariĝis armiloj, kaj malvizito de parencoj kaj geamikoj fariĝis ago de amo.

Subite vi rimarkas ke povo, belo kaj mono estas senvaloraj, kaj ne povus provizi vin oksigenon pro kiu vi batalas .

La mondo daurigas sian vivon kaj ĝi belas. Nur ĝi metas homojn en kaĝoj. Mi kredas ke ĝi sendas mesaĝon al ni:

Vi ne estas plu bezonata. La aero, tero, akvo kaj ĉielo fartas bone sen vi. Kiam vi revenus, memoru ke vi ne estas miaj estroj, sed miaj gastoj!



Socio

Ĝis kiam karuloj devas esti humiliga en tiu ĉi socio
Ĝis kiam klerulo, ve inda en tiu ĉi socio
Kiom la kaŝa senceleco en bonfarta vestaĵo
Ĝis kiam la taŭgulo, sen labora en tiu ĉi socio
La koloroj ĉiu momente havas cent artifikojn, ho ve
Ĝis la reviviĝo, klientplenas bazaro de tiu ĉi socio
Tiom elnudiĝis jam la artifikoj, ke iom post iom,
vekas la dormeman ebriulon en tiu ĉi socio
Admonanto ne admonu min, ĉar ne harmonias-
Ĝis eterne milito de parolo kun faro en tiu ĉi socio
Intelligentulon mi ne vidas, krom en izolejo
Kap' sur genuo, vizaĝ' vid-al-vide al muro en tiu ĉi socio
El antaŭvidanta okulo venas sango anstataŭ larmo
Ĉar tiom vidas li la sangant-okulojn en tiu ĉi socio
En la vesto de juvelŝtono, komercistoj negocas
Ŝtonon kaj gemon samkvante en tiu ĉi socio
Tiom dolorinda estas nun la aero de la epoko
Ke spirado jam fariĝis pli malfacile en tiu ĉi socio

De: Moini Kermanŝahi, tradukis: M. Fahmi

اجتماع

برگرفته از اشعار آقای مصنی کرمانشاهی از کتاب "ای شمع با بسوزید"

تابه کی بید عزیزان، خوار در این اجتماع	تابه کی بید عزیزان، خوار در این اجتماع
کلاه آمد تابه کی بیکار در این اجتماع	ناله‌های چند پنهان در لباس عاقبت
تا قامت گرمی بازار در این اجتماع	رنگها مردم به صد نیرنگ دارند ای صبح
مست خواب آلوده را بیدار در این اجتماع	بسکه عریان قند ما کرده، کم کم می کند
ارزنی گفتار، با کردار در این اجتماع	ناصحا بنده، سازش ندارد تا ابد
سربه زانو، روی بر دیوار در این اجتماع	هوشمندی را نمی بینم، مگر در خلوتی
بسکه بیند دیده خونار در این اجتماع	عاقبت بین راه جای اشک، خون آید ز چشم
سنگ و گوهر را به یک مقدار در این اجتماع	در لباس کوهری، سوداگران سودا کنند
دم کشیدن گشته پس دشوار در این اجتماع	بس که درد آلوده است اکنون، هوای روزگار

ساعت ۲۵ زبان کجاست؟

گپ و گفت سبزاندیشان با مؤلف و مترجم برگزیده ۴ دوره کتاب سال



محمد کرام‌الدینی پژوهشگر، مترجم، مؤلف و معلم ایرانی؛ نویسنده و مترجم مقالات و کتاب‌های علمی-آموزشی و نیز روزنامه‌نگار علم است. او دارنده عنوان مؤلف و مترجم برگزیده چهار دوره کتاب سال (۱۳۸۵، ۱۳۸۹، ۱۳۹۰ و ۱۳۹۶)، چهار دوره جشنواره کتاب‌های آموزشی رشد (سومین، ۱۳۸۱، نهمین، ۱۳۹۰، دهمین، ۱۳۹۲) و پانزدهمین (۱۳۹۶)، بیست‌ویکمین جشنواره کتاب‌های دانشگاهی (۱۳۹۱)، هفتمین (۱۳۹۴) و نهمین (۱۳۹۶) جشنواره کتاب‌های برتر کودکان و نوجوانان و نیز دارنده شش نشان چهارستاره از شورای کتاب کودک (۱۳۹۷) است. ایشان همچنین داور ۱۶ مورد داوری علمی جهانی، ۹ مورد داوری فرهنگی-علمی کشوری و دارنده ۲۰ مورد افتخار علمی-فرهنگی-هنری است.

علاوه بر این‌ها محمد کرام‌الدینی یکی از اسپرانتودانانی است که از حدود ۴۰ سال پیش زبان را آموخته و در این زمینه از خود آثاری برجای گذاشته است. در این مصاحبه درباره موضوع‌های مختلف، از جمله آثار اسپرانتوی او گفت‌وگو کرده‌ایم.

کنم: یکی کتابی تحت عنوان «کارلو» و کتاب دیگری تحت عنوان «ال‌لرنو» که هر دو آموزشی بودند. در مراجعات و جست‌وجوهای بعدی، چند کتاب دیگر هم پیدا کردم که یکی از آنها «ماجرای یک پیشتاز» بود که شرح ماجراهای «ادموند پریوات» یکی از پیشتازان زبان اسپرانتو در سوئیس است. بعد از آن توانستم تعدادی کتاب و مجله به زبان اسپرانتو پیدا کنم، بخوانم و حتی سعی کردم بعضی‌ها را به قصد تمرین و تحکیم یادگیری به فارسی ترجمه کنم.

پس شما خودآموخته هستید و آموختن اسپرانتو را بدون شرکت در کلاس شروع کردید؟

بله، نه تنها بدون شرکت در کلاس شروع کردم؛ بلکه تا این لحظه هم هرگز برای آموختن آن در هیچ کلاسی شرکت نکرده‌ام. من در اسپرانتو هم مانند بسیاری چیزهای دیگر خودآموخته هستم. در شهرستانی که در آن زمان زندگی می‌کردم، کسی را ندیده بودم که قبل از من چیزی درباره اسپرانتو شنیده باشد. جالب این بود که من از نظر زبانی در انزوای کامل بودم، ولی سعی می‌کردم زبانی جهانی را بیاموزم که درست در نقطه مقابل انزوا قرار دارد و برای برقراری ارتباط‌های گسترده بین انسان‌هاست.

برای شما که در انزوای کامل زبانی بودید، آموختن یک زبان جهانی چه جاذبه‌ای داشت؟

اندیشه زبان جهانی، بسیار جذاب، جالب،نجیبانه و شریف است. وجود زبانی که اولاً بی‌طرف باشد، به قصد فریب و چپاول و نیرنگ و سلطه ساخته نشده باشد، ثانیاً به نسبت آسان و کاملاً قاعده‌مند باشد و ثالثاً به یکسان و بدون تبعیض در دسترس همه باشد، از آرزوهای هر انسان و دنباله پیگیری‌های برخی دانشمندان، از جالینوس گرفته

چطور با اسپرانتو آشنا شدید و چگونه آن را یاد گرفتید؟

آشنایی من با اسپرانتو مثل بسیاری از مواردی که در زندگی روی می‌دهد، کاملاً بختانه یا تصادفی بود. فکر می‌کنم یکی از روزهای سال ۱۳۵۴ یا ۵۵ بود که چشمم به کتابی افتاد که رویش نوشته شده بود: «زبان دوم، خودآموز زبان جهانی اسپرانتو، معرفی برترین دستاورد بشر در قلمرو زبان» تألیف دکتر صاحب‌الزمانی. کتاب عنوان جالبی داشت؛ به طوری که فوری در ذهنم نقش بست. من آثار بسیاری از این مؤلف را در زمینه‌های روان‌شناسی و ... خوانده بودم؛ چون ایشان در زمان نوجوانی ما بسیار پرکار و معروف بودند و من هم در آن زمان کمابیش سر در کتاب داشتم. البته، در آن زمان هیچ تلاشی برای آموختن زبان اسپرانتو نکردم. حدود سه چهار سال بعد در یک کتاب‌فروشی در یکی از شهرستان‌ها، باز هم کاملاً بختانه چشمم به همین کتاب خورد. چون سابقه ذهنی داشتم، آن را خریدم و خیلی زود شروع به خواندن کردم و تازه متوجه شدم که این کتاب در واقع بیشتر خودآموز زبان است. فکر می‌کنم حدود سال ۱۳۵۹ بود؛ بنابراین، می‌توانیم بگوییم که من دقیقاً ۴۰ سال است کم‌وبیش در اقیانوس زبان اسپرانتو دست‌وپا می‌زنم!

در آن زمان چه کتاب‌های دیگری در زمینه زبان اسپرانتو مطالعه کردید؟

به همان کتاب‌فروشی که کتاب «زبان دوم» را از آن خریداری کرده بودم و ظاهراً نماینده ناشر کتاب زبان دوم در آن شهرستان بود، مراجعه کردم و خواستم کتاب‌های دیگری در این زمینه به من بدهد. او مرا به انبار کتاب‌هایش برد که پر از کتاب‌های مختلف بود و هیچ نظمی در چیدن آنها وجود نداشت. ناچار، کتاب‌ها را یکی‌یکی واریسی کردم و موفق شدم دو کتاب دیگر هم در این زمینه پیدا

تا فرانسویس بیکن و دکارت است که طرح‌هایی برای زبان جهانی بی‌طرف پیشنهاد داده‌اند. از سوی دیگر، شما می‌دانید زبانی که امروزه به عنوان زبان جهانی بر جهان مسلط و حاکم است، هیچ کدام از ویژگی‌هایی را که گفتیم، ندارد.

در این ۴۰ سال در زمینه اسپرانتو چه کردید؟ مختصری از فعالیت‌هایی که در رابطه با اسپرانتو انجام دادید برایمان بگویید.

در ابتدا سعی کردم زبان را خوب یاد بگیرم و به آن تسلط پیدا کنم. پس از آن همان‌طور که گفتم، شروع به ترجمه متون کردم. مثلاً در اوایل داستان‌هایی از «گی دو موپاسان» نویسنده فرانسوی را از اسپرانتو به فارسی برگرداندم. دوستی داشتم به نام آقای «محمدعلی آزادخواه» که در آن زمان دست به قلم و با آداب نوشتن آشنا بود و قبلاً داستان‌هایی نوشته و منتشر کرده بود. او به یاری من آمد و داستان‌هایی را که به فارسی ترجمه کرده بودم، ویرایش کرد. من هم کمی بعد تلافی کردم و تعدادی از داستان‌های کوتاه و یکی از رمان‌های کوتاهی را که برای نوجوانان نوشته بودم، به اسپرانتو برگرداندم. عنوان این کتاب هست «مرادو». کتاب اصلی «مرادو» در سال ۱۳۸۵ به عنوان کتاب سال معرفی و بر اساس آن فیلمی هم ساخته و اکران شد؛ اما متأسفانه هنوز امکان چاپ و انتشار ترجمه من میسر نشده و دست‌نوشته‌های این ترجمه که در آن زمان با ماشین تحریری قدیمی تایپ شده‌اند، همچنان در حال خاک خوردن‌اند.

حدود ۳۰ سال پیش هم محض تمرین زبان‌آموزی، یک رمان قدیمی را از اسپرانتو به فارسی ترجمه کردم. عنوان این کتاب هست «ولگردها»، از «ایوان وازوف» نویسنده بلغار. این کتاب بعد از ۳۰ سال توقف، اخیراً منتشر شده است. البته، در مقدمه کتاب درباره انگیزه‌ام از ترجمه از اسپرانتو و انتشار آن مفصل توضیح داده‌ام. بعلاوه، در همان سال‌های جوانی مطالبی در زمینه‌های مختلف

علمی، فرهنگی یا هنری در برخی نشریات فارسی و اسپرانتو منتشر می‌کردم. بیشتر ترجمه‌های علمی من از اسپرانتو به فارسی در نشریه اطلاعات علمی چاپ می‌شد. به یاد دارم حتی نشریه‌ای بود به نام «صفحه اول» که ترجمه مطالب مهم نشریات مختلف را از سراسر جهان جمع‌آوری و منتشر می‌کرد. من مطالبی از مطبوعات اسپرانتو زبان برای آن انتخاب و ترجمه می‌کردم.

چند مقاله هم درباره اسپرانتو در مطبوعات کشور منتشر کردم. عنوان یکی از نمونه‌های آن هست «ساعت ۲۵ زبان کجاست» که در سال ۱۳۷۱ در نشریه آینه اندیشه چاپ شد و در آن به ریشه‌های زبان بین‌المللی، کاستی‌های زبان انگلیسی و مزایای اسپرانتو و نیز نیازهای علم به این زبان توضیح داده‌ام. متأسفانه، همه نوشته‌ها و مقالاتی را که در این زمینه منتشر کرده‌ام، به یاد ندارم که فهرست کنم.

همزمان، نوشته‌ها و مقالاتی به زبان اسپرانتو هم می‌نوشتیم که برخی از آنها در مطبوعات بین‌المللی به چاپ می‌رسید. برخی از آنها علمی بودند، مانند مطلبی که درباره گوزن زرد ایرانی نوشتیم تحت عنوان «آیا گوزن زرد ایرانی دوباره زنده می‌شود؟» و در سال ۱۹۸۹ در شماره ۱۱۳ نشریه «کنتاکتو» منتشر شد. البته، در آن زمان هنوز این گوزن مثل امروز معروف نشده بود. برخی نوشته‌ها را هم به قصد معرفی فرهنگ ایرانی و اسلامی نوشتیم؛ از جمله مقاله‌ای درباره امام محمد غزالی که در سال ۱۹۹۹ در شماره ۱۷۳ «کنتاکتو» منتشر شد. همچنین نقد و معرفی فیلم معروف «خانه دوست کجاست» از عباس کیارستمی را در سال ۱۹۹۰ برای نشریه «موناتو» نوشتیم که منتشر شد.

در ترجمه از اسپرانتو به فارسی و به‌عکس، با چه چالش‌هایی روبه‌رو بوده‌اید؟


خوشبختانه ترجمه از اسپرانتو و به‌عکس، نسبت به ترجمه از زبان انگلیسی که در واقع یکی از حرفه‌های من است، چالش‌هایی بسیار اندک دارد؛ چون اسپرانتو زبانی کاملاً قانونمند است. مثلاً می‌توانم بگویم تنها چالش‌های پیش‌روی من در ترجمه رمان کوتاه مرادو، ترجمه اصطلاحاتی بود که منطقه‌ای هستند و در جاهای دیگر دنیا رایج نیستند. مثلاً یادم هست که قهرمان داستان در یک جا می‌گوید: ... شب‌اداراری‌ها همه به علت این کشک‌های سرد است که می‌خوری ... بدیهی است که اولاً ترجمه واژه کشک خود چالشی است و ثانیاً مفهوم سردی و گرمی غذاها که در طب سنتی ما رایج است، دشوار است. البته این چالش برای همه زبان‌هاست.

ظاهراً شما طراح کاریکاتور هم بوده‌اید. در این زمینه هم در رابطه با اسپرانتو کاری انجام داده‌اید؟

بله، در همان ایام جوانی گاه کاریکاتورهایی برای نشریات می‌کشیدم. نمونه‌هایی از آنها در مجله ماهانه «موناتو» که نوشته‌های فقط اصیل اسپرانتو (یعنی غیرترجمه) را چاپ می‌کند، به چاپ رسید.

موقع یادگیری اسپرانتو کدام مبحث یا مباحث شما را بیشتر به چالش می‌کشید؟ به عبارت دیگر یادگیری کدام مبحث یا مباحث در اسپرانتو دشوار تر می‌نمود؟

در اسپرانتو مبحثی داریم تحت عنوان «آکوزاتیو». این مبحث نه تنها برای ما فارسی‌زبانان؛ بلکه برای گویندگان دیگر زبان‌ها نیز اندکی دشوار است و نیاز به تمرین بیشتر دارد. در محیط‌های مجازی فراوان دیده‌ام که از آن به عنوان موردی دشوار در آموزش اسپرانتو یاد می‌کنند؛ اما می‌دانیم که «آکوزاتیو» نقش مهمی در رسایی زبان دارد. یک‌بار کاریکاتوری درباره این مبحث کشیدم که در سال ۱۹۹۰



نگوییم که الان اکثریت مردم جهان به اسپرانتو سخن می‌گویند. یا در وصف دکتر زامنهوف، مخترع اسپرانتو مطالب اغراق‌آمیز نگوییم؛ بلکه به جای آن از بی‌طرفی و اندیشه انسانی زبان بین‌المللی صحبت کنیم. به نظر اندیشه زبان بی‌طرف جهانی خود به اندازه کافی برای جوانان جذابیت دارد.

دوست داریم ما را مهمان مطلبی به اسپرانتو کنید. هر چیزی که فکر می‌کنید می‌تواند برای خوانندگان جالب باشد.

سال‌ها پیش، یعنی در همان زمان‌های فعالیت برای اسپرانتو چند داستان کوتاه به اسپرانتو ترجمه کردم که در نشریه «کنتاکتو» چاپ شد. به نظر این یکی هم به اندازه کافی کوتاه است، هم جالب:

Ĉe Kiu Mi Plendu?

Iun printempan matenon, lepora paro, ĵus-geedziĝintaj gaje ŝprucis akvon sur unu alian, postkuris unu alian, rulis sin sur herbejoj kaj havis por si tute apartan mondon.

Malsata lupu trovis ilin, kaŝsekvis ilin, kaj je konvena momento tute facile kaptis la virleporon, eksidis, disŝiris kaj elmanĝis ĝin!

La leporino ploregante komencis alkuri al leono por prezenti sian plendon al Lia Reĝa Moŝto.

Atingite proksime al la leona kastelo, ŝi ekaŭdis manĝo-klakadon. Tuj ŝi ekrigardis tra branĉetoj por kompreni la kialon. ŝi mirege ekvidis ke la leono estas jam dispeciginta sovaĝan bovon kaj per sangokovritaj kapo, muzelo kaj ungegoj ĝuoplene voras la koron kaj hepaton de la bovo.


Timotreme de la tuta korpo frostigis sangon en la vejnoj de la kompatinda vidvina leporino. Subite kiel kuglo elpafita el pafilatruo, ŝi eksaltis freneze, ekkuris kuradis kaj malaperis por ĉiam en la mallumo de l' ĝangalo!

در نشریه «موناتو» چاپ شد. در این کاریکاتور پزشک به شخصی که به علت نداشتن تسلط به کاربرد آکوزاتیو، حرف N مربوط به آکوزاتیو را خورده و ادا نکرده است، توصیه می‌کند که بهتر است «آکوزاتیو» را بیشتر تمرین کند تا بهبود یابد!

آیا از شرکت در کنگره‌ها یا میزبانی و ملاقات با اسپرانتودانان خاطره‌ای دارید که بخواهید برایمان تعریف کنید؟

متأسفانه تاکنون بخت شرکت در هیچ کنگره یا همایش بین‌المللی را نداشته‌ام.

برای ترویج و گسترش اسپرانتو، به‌خصوص در میان جوانان شما چه راهکار یا راهکارهایی پیشنهاد می‌دهید.



به نظر من باید در همه موارد از جمله آموزش زبان با فراگیران صادق باشیم. اغراق در ویژگی‌ها و موقعیت زبان اسپرانتو که از سوی برخی از ما انجام می‌شود، کار درستی نیست، مثلاً نگوییم که اسپرانتو به اندازه‌ای آسان است که در دو ساعت می‌توان آن را فراگرفت، یا



Eble la vivo ne estus tiu festo, kiun vi deziras, sed nun ke vi invitigis al ĝi, kiel plej eble dancu bele.

Charlie Chaplin

Diversaĵoj

Stranga Signo

Grekoj uzas punktokomon anstataŭ demandosigno.

La Plej Mallonga Rakonto

“For Sale. Baby Shoes, Never Worn”.
E-o: “Por Vendo: Beboj Ŝuoj, Neniam Surmetita”.
La supra skribaĵo ne estas nur unu frazo, sed la plej mallonga rakonto, kiun verkis Ernest Hemingway. Li verkis tiun ses-vortan rakonton por iu mallong-rakonta konkurso kaj estas interese, ke li sukcesis gajni ĝin.

Malfacila Adiaŭo

Neniu adiaŭo sur la mondo estas pli malfacila ol la adiaŭo de la potenco.

Nenovaĵa Tago

En la 18-a aprilo de 1930, BBC anoncis: “Hodiaŭ estas neniu novaĵon” kaj anstataŭ la novaĵo elsendis pinan muzikon.

Unua Aviadilo

La unua aviadilo flugis 12 sekundojn en la jaro 1903.

La Olimpika Medalo

La ora Olimpika medalo estas farita el la arĝento.

Ova Fobio

Foje Alfred Hitchcock en intervjuo diris: Mi suferas ovan fobion. La blankaĵo ĉirkaŭ la ovo, kiu havas nenium truon vere estas timiga. Ĉu vi jam vidis rompi ovon?

Kreemaj Verkistoj

La verkistoj probable kreis pli kreemajn manierojn por rabi la bankojn ol la verajn la rabistojn de la bankoj.

Kiu Pli Frue Frostas?

